„Mutig vorwärts!“ **Aŭstria Esperantisto** „Kuraĝe antaŭen“

Aŭstria Esperantisto

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio

10a jaro. N-ro 6 **Monata** **Junio 1933**

Redaktejo kaj Administrejo: Wien, I., Neue Burg (Tel. R 27-803).

Konto bei der Postsparkasse D-123.826

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ S 3.90, germanlandanoj RM 2.75 alilandanoj sv. fr. 3.50; ponumere: por enlandanoj 35 aŭ. g., eksterl. 45 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

Aus aller Welt.

Nach Liechtenstein hat nun auch Ungarn offizielle Postkarten mit Esperanto-Text herausgegeben.

Generaldirektion für Post
und Telephon in Ungarn

Budapest, 29. April 1933.

No. 81492
X. 3. 1933

Illustrierte Postkarte mit Text in Esperanto.

Meine Herren,

In Verfolg meines Schreibens vom 22. Januar 1931, No. 98.434/1931 habe ich die Ehre, Ihnen zur Kenntnis zu bringen, daß die Postverwaltung Ungarns soeben eine Serie von Postkarten zu 16 Filer mit 16 verschiedenen Illustrationen herausgibt, die außer mit ungarischem und französischem Texte auch mit einem erklärenden Text in Esperanto versehen sind.

Genehmigen Sie meine Herren die Versicherung meiner Hochachtung

Der Generaldirektor: Szalay

An den Intern. Zentralausschuß der Esperanto-Bewegung
11 Rue du Mont Blanc, Genève.

Der neue **Weihbischof von Prag Doktor Eltschkner**, Präsident des Verbandes katholischer Esperantisten in der Tschechoslowakei, hat in sein bischöfliches Wappen den Esperanto-Stern aufgenommen.

Prinzessin Alice von Griechenland hat ihre Teilnahme am 25. Esperanto-Weltkongreß in Köln angemeldet.

Auf Veranlassung des **Bürgermeisters von Lyon**, des früheren Ministerpräsidenten Herriot, hat der Stadtrat beschlossen, einen privaten Esperanto-Kurs in einen städtischen mit 36 Unterrichtsstunden umzuwandeln.

Die **Handelskammer von Boulogne** sur Mer Frankreich, versendet in alle Welt ein Werbezirkular für den Hafen von Boulogne in Esperanto.

Das **Nürnberger Adreßbuch 1933**, das die Adressen vieler Exportfirmen enthält, benützt in seinem Branchenteil Esperanto neben den hauptsächlichsten europäischen Sprachen.

Die **Radiostation „Eiffelturm“-Paris** hat der Französischen Esperanto-Landesorganisation jeden Samstag 20 Minuten für Esperanto-Sendungen den Fremdenverkehr betreffend zur Verfügung gestellt. Diese Verfügung wurde vom Minister für Post- und Telegrafenwesen auf Grund Verwendung durch den Staatssekretär für Fremdenverkehr H. Appel getroffen.

Die **Ungarische Pfadfinder-Liga** hat anläßlich des Pfadfindertreffens in Gödöllö (1.—15. VIII. 1933) ein Wörterbüchlein herausgegeben, in welchem die wichtigsten Wörter aus der ungarischen Sprache erklärt sind durch Uebersetzung in Deutsch, Französisch, Englisch und Esperanto.

„Der Weckruf des Katholischen Schulvereines“, Wien, bringt in seiner Folge 9 einen langen Artikel „Warum sollen wir Esperanto lernen?“ von Reg.-Rat Steiner.

Die Anschrift des **„Oesterreichischen Esperanto-Bundes“** ist jetzt Wien I. Neue Burg. Anfragen ist stets Rückporto beizuschließen. Tel. R 27803.

Professor Dr. Vincenzo Musella hielt auf Veranlassung der italienisch-britischen Liga in deren Heim in Neapel einen Vortrag in Englisch und Esperanto, um so das faschistische Italien dem Auslande näher zu bringen.

„Kredit als Weltschicksal" von Egon Scheffer, erschienen im Reinhold-Verlag Wien und Leipzig, in deutscher Sprache, 430 Seiten, behandelt auch die seinerzeitigen Bemühungen der Esperanto-Weltorganisation, eine Weltwährung einzuführen.

Konferenco en Genève.

La kunveno, kiu okazis en Genève la 20.—22. majo 1933 kaj en kiu partoprenis:

1. S-ro **Ed. Stettler**, prez. de UEA,
2. S-ro **Fr. Schoofs**, sekr.-kas. de Konstanta Reprezentantaro de la Nac. Societoj kaj reprez. de Be'ga Ligo Esp.,
3. S-ro **C. C. Goldsmith**, reprez. de Brita E-Asocio kaj de Brazila Ligo Esp.,
4. S-ro **René Dubois**, reprez. de Societo Franca por la Prop. de Esp., de Hispana E-Asocio kaj de Kataluna E-Federacio,
5. S-ro **Rob. Kreuz**, reprez. de Centra Dana E-Ligo kaj delegito de Itala E-Federacio,
6. S-ro **Hugo Steiner**, reprez. de Aŭstria E-Asocio,

ekzamenis la situacion de la organizo de la tutmonda E-movado. Ĝi starigis planon por prepari la vojon al interkonsento ĝenerala.

Tiu plano estas nun submetata al la landaj societoj kaj al la komitato de UEA.



Adreso: Trajanstr. 25.
Kotizo: Rm 20.—.
Programo:

29. VII. — 10 h kunsido de ICK kun LKK; 11 h 1-a kuns. de KR; 15 h jarkunveno de Germana E-Asocio; 18 h 1-a kuns. de UFE, KR kaj ICK; 20 h 30 interkonatiĝa vespero.

30. VII. — 8 h 30 Diservoj; 10 h 30 Solena Malferma kunsido; 16 h Malfermo de Somera Universitato; 17 h kunsido de UEA-Komitato; 18 h 2-a kuns. de ICK; 20 h 30 Literatura Vespero.

31. VII. — 9 h fakkunsidoj; 10 h 1-a laborkunsido; 14 h 30 fakkunsidoj; 16 h Somera Universitato; 17 h 2-a kuns. de KR; 18 h fakkunsidoj; 18 h 30 kunsido de UFE.

1. VIII. — 9 h fakkunsidoj; 10 h 2-a laborkuns.; 14 h 3-a kuns. de ICK; 15 h fakkunsidoj; 15 h 30 2-a kuns. de UFE; 17 h 3-a kuns. de KR; 20 h 30 Rejnlanda Vespero.

2. VIII. — 9 h fakkunsidoj; 10 h UEA-kunveno; 15 h Somera Univ.; 17 h 2-a kuns. de UFE, KR kaj ICK; 17 h fakkunsidoj; 18 h fakkuns.; 20 h 30 Festaranĝo de UEA-jubileo.

3. VIII. — 10 h tuttaga ŝipekskurso al Sep-montaro (Königswinter).

4. VIII. — 9 h fakkuns.; 10 h 3-a laborkuns.; 14 h 30 vizitoj al diversaj fabrikejoj; 15 h fakkuns.; 16 h 4-a kuns. de ICK; 20 h 30 Internacia Balo.

5. VIII. — 10 h Ferma kunsido; 14 h ekskurso; 20 h 30 Gaja vespero laŭ Kolonja maniero (aranĝota de la lokaj grupoj Köln).

6. VIII. — **Postkongresaj ekskursoj.** De Köln al Koblenz (vizito al kastelo kaj fortikaĵo Ehrenbreitenstein) al Bingen. Akcepto, festeto, tranokto.

7. VIII. De Bingen al Niederwald, Mainz (vizito), Wiesbaden (veturo al Neroberg). Kunestado kun Mainz-aj kaj Wiesbaden-aj s-anoj, tranokto.

8. VIII. De Wiesbaden al Frankfurt (rondveturo, vizito). Post vespermanĝo finiĝos la ekskurso. — Tutvojaĝa prezo 46 Rm.

Aŭstria karavano al la kongreso.

Pro nesufiĉa partopreno mi bedaŭre ne povas aranĝi aŭtobuskaravanon al Köln. Sed mi rekomendas al la aliĝintoj veturi al Köln sur pli mallonga vojo. Ankaŭ mi mem intencas partopreni la kongreson.

La personoj, kiuj jam pagis la kotizon por la aŭtobuso, ricevos en la venontaj tagoj siajn pagojn.

Laŭ informoj de Germana E-Asocio kaj Kongres-Komitato la Esp.-insigno estas respektata kaj neniu, kiu venos al la kongreso, bezonas timi malagrablajojn! Kontraŭe: Germana E-Asocio faris raporton al la „Ministerio por Internaj Aferoj" kaj al la „Ministerio por Popolklerigado kaj Propagando" pri sia agado kaj laborkampo kaj disponigis sin al la laboro en la servo de sia patrolando.

Steiner

Ĉefepiskopa katedrala kaj diocesa muzeo.

En Wien antaŭ nelonge estis malfermata nova ekezia muzeo en la ĉefepiskopa palaco. Pri ĝi ni raportos pli detale.

Atentu jenajn adresojn:

Internacia E-Muzeo
Aŭstria Esperanto-Asocio
Aŭstria Esperantisto
Esperanto-Klubo, Wien
ĉiuj Wien I. Neue Burg, tel. R 27803.

Al demandoj nepre aldonu respondafrankon!

La Sankta Patro distingis
Kancelieron d-ro Engelbert Dollfuß per Grandkruco de Pio-ordeno,
Ministron d-ro Kurt Schuschnigg per Grandkruco de Gregorio-ordeno kaj
Ministron generalon Karl Vaugoin per Grandkruco de Gregorio-ordeno (milit-kategorio).
Respektplene gratulas: Int. Esperanto-Muzeo, Aŭstria Esperanto-Asocio.

La Federacia Prezidanto de Aŭstrio distingis

La ĝeneraldirektoron de Radio-Verkehrs A. G., Wien, s-ro **Oskar Czeija** per la „Granda arĝenta Honorinsigno pro meritoj je la respubliko".

Elkore gratulas: Por Int. Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio: Steiner.

Fremdulfrekvent-favorigo en Aŭstrio.

La aŭstria Federacia Prezidanto je propono de sia registaro komisiis, rekonante la nepran gravecon de „Kreado de laboreblecoj" kaj „Fremdulfrekvento", la parlamentanon **Odo Neustädter-Stürmer** je la taskoj de vic-ministro por „Kreado de laboreblecoj kaj Fremdulfrekvento".

Ministeria konsilanto **inĝ. Erwin Deinlein** estis samtempe nomita referanto por la agendoj de la ŝtata fremdulfrekvento.

Ni gratulas al ambaŭ sinjoroj kaj ĝojas pri ĉi tiuj elektoj, ĉar ambaŭ sinjoroj donas la garantion, ke ili ankaŭ venontatempe multe eluzos la servojn de Esperanto, kiujn speciale min. kons. inĝ. Deinlein oficiale jam ofte rekonis.

Skribe ni tuj disponigis la servojn de Esperanto al la nova vicministro.

Aŭstria Esp.-Asocio: Steiner

Int. Esperanto Muzeo en Wien

Wien, I. Neue Burg, Heldenplatz.
Telefono n-ro R 27-803

Malfermata labortage 9—12, 15—18 h; sabate 9—12 h.

Dumvivaj membroj (Aŭstrio S 15.— ev. en 3 partpagoj), por alilandanoj svis. fr. 12.50; ili enpagu la egalvaloron ĉe iu banko de sia loko por la konto de „Oesterreichische Credit-Anstalt, Wien I. Renngasse" kun la ordono, ke oni pagu al la Muzeo la koncernan sumon en aŭstriaj ŝilingoj.

488. Franz Wandl, instr., Hainfeld; 489. d-ro inĝ. Emilian Loth, Lodz; 490. d-ro Maksymiljan Jozef Ziomek, Kraków; 491. G. Spoon, Rotterdam; 492. Ed. Stettler, prez. de UEA, Bern; 496. Frederic Faraker, Sydney, New South Wales; 497. J. O. Ekengren, fervojisto, Kiruna, Svedujo.

Grupoj pagas la saman kotizon por 10 jaroj:

41. „La Stelo", Groupe Espérantiste Genevois, Genève; 42. Oomoto Internacia (Prez. Onisabro Deguĉi), Kameoka, Jap.

Ricevitaj sendaĵoj:

78. L. Agourtine, Paris; 79. H. Sentis, Grenoble; 80. P. H. de Jonge, Bergen op. Zoon, Nederl.; 81. Suda Ligo, Mannheim; 82. C. Barthel, Frankfurt (interesaj fotoj kun nia majstro); 83. L. Agourtine, Paris; 84. R. F Vaugham, Sandakan, Brita Nord Borneo; 85. d-ro F. J. Williams, Samarai, Papua; 86. H. Sentis, Grenoble; 87. Sveda E.-Eldonejo, Stockholm; 88. B. Siegert, Schweidnitz; 89. Nik. Spagadores, Kavala, Grekujo (Oficialaj reskriptoj de la registaro); 90. kaj 91. UEA, Genève; 92. R. Kozeschnik, Wien (Aro da Ido-libroj); 93. P. Neergaard, Kobnhaven (N: Fremdvortoj en E.); 94. G. Langner, Görlitz; 95. Aerologia Observatorio, Tateno, Jap. (N: Raporto n-ro 7; Observadoj Meteorologiaj kaj aerologiaj n-ro 1 kaj 2); 96. Runham Brown, Enfield, Angl.

Internacia perfektiga kurso.

Gvidanto: Andreo Cseh. Lecionoj ĉiutage de 9—13 h de 24.—29. julio. En la vesperoj „instruaj prelegoj" kaj „amuzaj aranĝoj". Plej efika praktika uzo de la lingvo dum la posttagmezaj ekskursoj.

Partopreno rekomendata al personoj, kiuj sin preparas al ekzameno, kaj al gvidantoj de daŭrigaj kursoj. Kotizo por lecionoj, prelegoj, aranĝoj 6 guld.

Intern. kurso por komencantoj.

Gvid.: A. Cseh, de 7.—17. aŭg., ĉiutage 4 instruhorojn. Posttgm. plezuraj kaj studaj ekskursoj, vespere alterne amuzaj kaj seriozaj kunvenoj kun prelegoj kaj lumbildparoladoj.

Partoprenu komencantoj kaj ankaŭ malnovaj s-anoj, kiuj deziras studi la metodon. Kotizo por la kurso kaj la aranĝoj 10 guld.

Premio: Varbinto de 3 personoj povas partopreni senpage.

Seminario por Cseh-metodaj instruistoj.

Por gvidontoj de tiaj kursoj. Programo: a) prelegoj de A. Cseh pri sia kurs-sistemo, la principo de la metodo kaj la tekniko de la aplikado; b) konsiloj al instruantoj; c) praktikaj prov-ekzemploj; ĉ) raportado de diverslandaj instruistoj pri siaj spertoj; d) diskutado; e) provlecionoj de partoprenantoj. Daŭro 7.—17. aŭg.; kotizo: 5 guld. Komuna kotizo por Seminario kaj komenca kurso: 12.50 guld.

Ĉiuj tiuj aranĝoj okazos en la Esp.-domo en Arnhem. Loĝebleco en la hotelo de la E-domo; plena pensiono (fluanta akvo kaj 3 manĝoj) potage 3-4 guld. Servmono 10 %. Aliĝadreso: Intern. Cseh-Instituto de Esperanto, Oostduinlaan 32, Haag, Nederlando. — Diskonigu pere de via loka gazeto!

Paskaj Esperanto-Kunvenoj en Italujo. De 15.—23. de aprilo kunvenis en Roma, Genova kaj Milano italaj kaj eksterlandaj s-anoj por viziti Ekspozicion de la Faŝista Revolucio kaj ĉeesti *la manifestaciojn* de Sankta Jaro kaj viziti la Foiron de Milano. S-ano prof. B. Migliorini montris la glorajn restaĵojn de la antikva Roma epoko; poste la esperantistoj ricevis sur Placo Sa Petro la benon de la Papo, donitan de la loĝio de la granda preĝejo „urbi et orbi". En Genova: Vizito de „Opera Nazionale Balilla", ekskurso al Portofino. En Milano: Vizito al Kartusio de Pavia kaj al la Specimenfoiro; festeno kaj prezento de brila komedio de Goldoni „Kurioza Okazaĵo", ludata de diletantoj-esperantistoj. Inter la partoprenantoj estis generalo Bastien, Paris, prez. de Itala E-Federacio generalo Markizo Montezemolo kaj direkt. Kreuz de Internacia Centra Komitato, kiu al mi dum mia restado en Genève kun vortoj de granda laŭdo rakontis pri la vere bonega aranĝo. Steiner

Gravaĵoj.

Prof. Bruno Migliorini, membro de la Esp-Akademio, komisiita prof. en Roma Universitato kaj ĉefredaktoro de „Enciklopedia Italiana", estas nomita eksterordinara prof pri latinidaj lingvoj kaj literaturoj en Universitato de Fribourg, Svislando.

Radiostacio Luxemburg. Unu el la malmultaj stacioj, kiuj neniam sendis Esperanton. Instigu la stacion per simpla poŝtkarto. Adr.: Compagnie Luxembourgeoise de Radio, 53 ave. Monterey, Monterey, Luxemburg.

Vojaĝo al Ameriko.

D-ro Pitlik, vicprez. de Ĉeĥa Asocio E-ista, en julio forvojaĝos al Ameriko por viziti ankaŭ la ekspozicion en Chicago, kie li por 10 E-societoj faros peresperantan paroladon pri ĈSR. Fine de aŭgusto li revenos vizitinte multajn dumvojajn lokojn. Ni deziras plej bonan vojaĝon kaj sukceson.

Radio Eiffel-turo, Paris, dissendas ĉiusabate porturismajn informojn en Esp. de 15.15—15.30 MET. La 3. julio: Dunkerque ĉe la Norda Maro kaj ĝia haveno. Petu senpagan gvidlibron kun E-resumo de Radio-stacio Tour Eiffel, Paris.

Ĉeĥoslovaka antologio estas intencata eldoni. Informojn donas ĈAE aŭ senpere Rud. Hromada, Praha VII. Socharská 333.

„Vizitu la 10-an Estonan Nacian Kantfeston", E-lingva propagandilo, viziti ĉi tiun feston la 23.—25. de junio nj.

Ido el Radio-Kiev.

Ĉiun sabaton prksm 22-a horo Kiev disaŭdigas paroladojn en Ido. Oni diras, ke en USSR la E-movado estas tiom forta! Kiel Ido-disaŭdigoj povas okazi? Ili ne malutilas tiom, kiom ili konfuzigas la publikon. Plendu ĉe Radiocentro, Kiev, USSR.

„Vizitu Estonion". Nova turisma lando en la Nordo kun historiaj urboj. Jen la titolo de nova bela faldprospekto, eldonita de Centra Oficejo por Turismo en Tallinn, *1933. Multaj bildoj en la prospekto* allogos vin, viziti ĉi tiun belan landon, kie mi mem travivis belajn tagojn en societo de bonaj amikoj, vere esperantistaj en Tallinn, Tartu, Pärnu, Viljandi kaj Tapa. Vizitu la landon, vi ĝojos! Steiner

Organizo de Ŝtatfervojoj de Japanujo. Tabelo 50×57 cm, montranta la organizon de la japanaj fervojoj, eld. de Japana Esp.-Ligo Fervojista, adr.: K. Tanaka, Sekcio de Konservado, Departemento de Vojaj Konservado kaj plibonigado, Ministerio de Fervojoj, Tokio, Japan.

Jurnalo **„Ekskursants"**, organo de Latva Ekskursa Socito, Riga, komencis en sia organo propagandon por Esperanto.

(Informo de Dance, Valmiera, Latvio)

„Allgemeiner Deutscher Katholikentag" okazos 7.—12. septembro en Wien. Inter la aranĝoj okazos ankaŭ tiaj de Katolika Uniiĝo Esp. en Wien, prez. Chiba, IV. Schaumburgergasse 5. Informojn kontraŭ respondafranko. Kunhelpu bonvoligi ĉi tiun feston.

Aŭstria Esperanto-Asocio
Wien I Neue Burg, Heldenplatz

Ĝene alkunveno de AEA en Wien, la 4. de junio.

El la protokolo.

Prezidis dir. Fr. Menacher, vicprez. de V. E-Unio.

Protokolis Raimund Cech, afergvidanto de V. E-Unio.

Tagordo: a) malfermo, b) prelego de pasintjara protokolo, c) revizio de la rajtigiloj, d) raportoj, e) kasraporto, f) honorigo de meritplenaj s-anoj, g) statut-ŝanĝoj, h) nov-elektoj, i) laborprogramo, j) proponoj.

Dir. Menacher, anstataŭante prez. dir. Kaftan, malfermas la kunvenon je 9 h 30.

N. Hovorka prelegas leteron de prez. de AEA, dir. K. Wannek-Linz, kiu pro grava malsano ne povis veni, plue salutleteron de la grupo en Salzburg, telegramon de Stiria E-Soc., leterojn de Csl. E Asocio, Budapest-aj kaj jugoslavaj ges-anoj kaj Min. Mantel, Lemberg.

Reg. kons. Steiner salutas nome de ICK kaj UEA en Genève.

Afergvidanto R. Ulbrich informas, ke pro la festotaga poŝtservo la protokol-libro kaj kasoraporto, senditaj de prez. Wannek, ne alvenis. Pro tio reg. kons. Steiner proponas: „La ĝenerala kunveno konsentas, ke la nova estraro donu la senŝarĝigon al la malnova estraro post kontrolo de la kaso per la samtempe elektitaj dir. Schiebl kaj Cech.“ Akceptita.

Kortega kons. d-ro Heeber kaj reg. kons. Steiner kontrolas la rajtigilojn. Estas reprezentataj Unio, Katol Ligo Esp., E-Soc. por Stirio kaj Linz kaj izolulo insp. Kaiper, Gloggnitz.

Afergvidanto Ulbrich faras la agadraporton pri la lasta jaro. Malgraŭ la malbonaj cirkonstancoj la movado iom progresis. Bedaŭrinde pro malsaniĝo de prez. Wannek en la lastaj monatoj nenio estis entreprenata. Estis kreata Viena E-Unio. La grupo en Salzburg bone laboris En Salzburg, Wien, Graz, Lend, Mattighofen ktp. okazis E-kursoj. Steyr bedaŭras la forveturon de sia fervora ano al Praha Ĉe skoltoj propagando per flugfolioj, eldonitaj de AEA kaj aldonitaj al la skoltaj gazetoj de H Jakob. 5 pakaĵoj kun nutraĵoj el la kristnasko-kolekto estis donataj al senlaboraj s-anoj. Kontrakto de UEA estis farata; ĝi estas provizora kaj povas esti nuligata. Cetere nia organizo restis tute neŭtrala. Reg. kons. Steiner reprezentis AEA dum la Reorganiza Konferenco en Genève dum majo.

R. Cech proponas esprimi al AEA-prez. Wannek, la afergvidanto Ulbrich kaj la ceteraj funkciuloj publikan dankon. Akceptita.

Prez. Menacher sciigas la proponon de Unio, elekti dir. Wannek, kiu rezignis je AEA-prezidanteco, „Honora Membro“. Unuanime akceptita.

N. Hovorka nome de Unio proponas ŝanĝon de § 16 de la AEA-statutoj. Anstataŭ „Beiräte“ estu „Fachreferenten“. Akceptita. Plue § 17 estu anstataŭata per alia, kiu temas pri „Senato“ La paragrafo estu samteksta kiel la koncerna de Unio-senato. Akceptita. Krome Unio proponas, ke la senato estu la samaj personoj kiel tiuj en Unio, plue oni elektu por ĉiu liglando po 1 s-anon: Burgenland-prof. Moraseher, Kärnten-insp. Bausbach, Niederösterreich-kons. kons. P. Mestan, Oberösterreich-dir. Wannek, Steiermark-W. Rogler, Salzburg-prof. d-ro Christanell, Tirol-dir. A. Mair.

Akceptita.

Steiner proponas sugesti al AEA-Senato, ke ĝi elektu kiel prez. prof. d-ro Christanell-Salzburg kaj kiel sekr. K. Bartel Graz. Akceptita.

Prez. Menacher sciigas la proponon de Unio koncerne la novan AEA-estraron:

Prez: reg. kons. Hugo Steiner
Vicprez.: kalk. kons. Rudolf M. Frey
d-ro Emil Pfeffer
Ĝenerala sekr.: Nikolaus Hovorka, eldon.
Sekr.-kasisto: Ernst Werner, ŝtata ofic.
Sekr: Walter Mudrak, bankoficisto
Helpkasisto kaj gazetservo: Ludwig Kaff, universitatano
Referantoj: f-ino Felicitas Bassler, d-ro Alfred Engländer, f-ino Marie Fiedler, reg. kons Stengel.

Fino Thea Kohn kiel gasto petis la vorton kaj parolas kontraŭ la elekto de reg. kons. Steiner.

D-ro Pfeffer respondas, ke „ni atentu pri tio, kio nin kunigas, kaj forgesu, kio nin autaŭ jaroj disigis. Ni nur havu unu celon: la progresigon de Esp. por la bono de nia lando kaj de la tuthomaro.“

La elekto okazis kun ĉiuj voĉoj.

Steiner transprenas la prezidantecon kaj sciigas pri la laborplano por la venonta tempo: Internacia Konferenco Wien-Budapest 1934 (aranĝota de Frey. Steiner kaj sekcia ĉefo d-ro Uebelhör en kontakto kun la centro en Genève) kaj en kontakto kun ĝi la Aŭstrian E-Kongreson 1934 en Wien; E-propagando ĉe WIPAG (Intern. Ekspozicio de poŝtmarkkolektantoj junio 1933 en Wien); vojaĝo tra Aŭstrio, farante lumbildparoladojn pri Danzig en la diversaj urboj de Aŭstrio, unue por veni en pli intiman kontakton kun la grupoj ekster Wien kaj ankaŭ per tio instigi la publikon al Esp.-kursoj (la vojaĝo okazu fine de septembro); ĉiumonate interŝanĝo de raportoj inter AEA kaj la grupoj pri la lastmonaja agado; Katolika Tago en Wien (helpo per multnombra partopreno); inviti Universalan E-Kongreson por 1936 al Wien; Radio-Wien; fervojoj ktp.

Prez. Steiner dankas al la ĝisnunaj funkciuloj, speciale dir. Wannek kaj R. Ulbrich, pro iliaj klopodoj sub tiel malfavoraj cirkonstancoj.

Vicprez. Frey raportas pri la preparaj laboroj por „Internacia Konferenco Wien-Budapest 1934“.

La aliaj referatoj estas prokrastataj ĝis posttagmezo en la kafejo sur Kobenzl. — Fino 12 h.

Posttagmeza kunveno.

Komenco 16 h 30. Prez. Steiner salutas speciale la gastojn el Bratislava kaj s-anon Denes el Budapest.

Sekr. Mudrak parolas pri „Esperanto kaj la batalo por la paco“.

Tauber-Bratislava ĝojas, ke li povis denove partopreni kunvenon kaj memoras pri la belaj antaŭaj, kiujn li ĉeestis.

Barta-Bratislava tradukas la paroladon de Mudrak en la slovakan lingvon, por ke ankaŭ la novaj esp.-istoj komprenu ĝin.

Prez Steiner raportas mallonge pri la „Reuniga Konferenco“ en Genève kaj „Konferenco 1934“.

Denes-Budapest salutas nome de hungaraj s-anoj.

Ĝen. sekr. Hovorka parolas pri „Esperanto kaj literaturo“.

Fino 18 h. Sekvis komuna migrado, fotografado kaj hejmveturo.

AEA: Steiner, Hovorka

Al la grupoj kaj izoluloj.

La nova estraro alvokas vin je kunhelpo en la progresigo de nia movado en Aŭstrio!

1. Ni deziras pli intiman kontakton kun la grupoj kaj izoluloj.

a) la grupoj bonvolu sendi al ni ĉiumonate ĝis la 3. sian agadraporton pri la pasinta monato; same ili ricevos la nian.

b) izoluloj bonvolu sendi al ni notetojn pri la movado en sia regiono.

2. Gazetservo:

a) gr. kaj iz. afable sendu al ni tuj la adresojn de la gazetoj de siaj loko kaj regiono kun indiko de la partianeco.

b) ili informu nin, ĉu ili estas pretaj, doni mem al la koncernaj gazetoj necesajn notetojn (almenaŭ unufoje monate) aŭ ĉu ili deziras, ke AEA-gazetservo mem aranĝu la aferon.

c) bonvolu doni al ni la adreson de tiu s-ano, kiu kontrolos la gazetojn, ĉu ili publikigis la notetojn, senditajn aŭ transdonitajn al ili, kaj ankaŭ fidinde kolektos por ni la koncernajn eltranĉojn kaj ankaŭ aliajn por ni interesajn notetojn. Li afable sendos ilin kun indiko de la tago kaj aldono de la gazettitolo de la 1. paĝo al ni. Afranko 3 gr.

3. En nia oficiala organo AE ni publikigos informojn, sufiĉe frue alsenditajn.

4. Adresoj. Afable sendu al ni la adresojn de ĉiuj al vi konataj esp.-istoj el via loko kaj de aliaj en Aŭstrio. Vi multe helpos per tio.

5. Bonvolu fari al ni proponojn, sugestojn ktp. La devo de ĉiu s-ano estas kunhelpi kaj elpensi vojojn al sukceso de E en Aŭstrio.

6. Pripensu, ke venontjare estas intencata, aranĝi gravan „Internacian Konferencon Wien-Budapest". Eluzu ĉi tiun internacian aferon por instigi viajn samlokanojn al Esp.-kursoj en nunjara aŭtuno.

7. Por la sama celo AEA-prez. Steiner intencas en la dua parto de septembro fari rondvojaĝon tra Aŭstrio, parolante per lumbildoj germanlingve pri Danzig, la germana urbo, kaj je la fino montrante al la publiko en 10-minuta provleciono la belecon kaj facilecon de Esperanto. La kostoj estos proksimume 20 S po parolado, kiujn povos pagi Urania aŭ alia organizo, kun kiu vi aranĝos ĝin. Malfortaj grupoj, kiuj mem devas aranĝi, interkonsente ricevos je kostoj de l' prez. eventuale rabaton, por ankaŭ tie ebligi tian paroladon. Prez Steiner je tiu okazo ankaŭ vizitos la oficialajn kaj aliajn gravajn personojn, gazetredakciojn ktp. en la koncernaj lokoj kaj tiel varbos por Esperanto.

Bonvolu rapide priparoli la aferon en via grupo k. kun la koncernaj unuiĝoj kaj skribi al ni ĝis plej malfrue la 1. aŭgusto, por ke ni povu fari la vojaĝplanon ĝustatempe kaj ankaŭ informi la diversajn lokojn, kiam la parolado okazos. Nepre eluzu ĉiuj grupoj kaj ankaŭ izoluloj ĉi tiun bonan okazon!

7. Per grandaj streĉoj prez. Steiner sukcesis daŭrigi la aperigon de nia oficiala organo. Vi karaj abonu ĝin kaj abonigu viajn konatojn. La jarkotizo estas pagebla ankaŭ en 2 partpagoj. Grupoj, kiuj abonos por 75 % de siaj membroj, ricevos rabaton.

8. Al demandoj bonvolu ĉiam aldoni respondafrankon!

Do helpu nin pro la vera bono de nia afero! Por AEA: Steiner, Hovorka

Wien: E-Soc. „Danubio". Kunvenoj ankaŭ dumsomere ĉiun lundon. Programo: 19. VI. Novel-vespero (s-ino Ziwutschka „Dancu por ni!", mag. Taussig „Miaj lipharoj"): 26. VII. Parolata E-gazeto: Bassler, Cech, O. Foltanek, A. Klein, d-ro Pfeffer, Vasta; 3. VII. traduk-vesp.; 10. VII. ekzercvesp.; 17. VII. traduko.

Wien: Esperanto-Klub. Nia kunveno, la 22. VI. ne okazos. Ni nur kunvenos en kafejo „Konstantinhügel", Prater, Hauptallee, la 13. de julio je la 7. h. vesp. Ĉiu venu, membroj kaj aliaj samideanoj!

Nekrologo. Gravan perdon suferis E-Soc por Stirio per la morto de sia membro **Anna Bartel**, patrino de la stiria E-pioniro Karl Bartel, la 7. de majo. Multon perdis la movado en Graz, Stirio kaj Aŭstrio. S-ino Bartel multajn jarojn estis fidela helpantino ne nur de la societo sed ankaŭ de ties membroj. Partoprenante ĉiujn laborojn kaj zorgojn pri la movado, ŝi ne nur estis la korpa patrino de la pioniro **Karl Bartel**, ŝi estis ankaŭ la ĉiam helpopreta spirito de sia filo, ŝi estis la patrino de la societo. Kaj kiam eksplodis la mondmilito kaj soldatiĝis ne nur ŝia filo sed preskaŭ ĉiuj aliaj pioniraj membroj de la tiama Stiria E-soc., ŝi restis kvazaŭ la centro de la Stiria movado. Al ŝi la membroj sendis informojn pri ekzisto kaj bonfarto, ĉe ŝi la membroj havigis al si informojn. En siaj manoj ŝi kvazaŭ konservis la taskon daŭrigi la esperantismon de la membroj. En la entrepreno „Infanoj al Hispanujo", kiam la aŭstriaj infanoj suferis pro malsato, en 1920, kompreneble ŝi kunhelpis. Kun ĝojo ŝi ĝuis la sukceson de la menciita entrepreno. kiun ŝia filo esperplene estis aranĝinta. Do ne nur nia kara Karl Bartel perdis sian patrinon, sed ankaŭ E-Soc. por Stirio la sian. Elkora rememoro pri ŝi por ĉiam vivos en ĝiaj membroj. Malpeza estu al ŝi la tero. W. Rogler

Auf nach Kreuzenstein!

Am 2. Juli (bei Regenwetter am 9 Juli) am Hauptplatz Korneuburg um genau 10 Uhr Zusammentreffen der Esperantisten Wiens und ihrer Freunde. Entweder Fahrt von Wien Nordbahn nach Korneuburg (Wien 9h 20) oder mit Trambahn bis zu dem Punkte, wo die Trambahn von der Reichsstraße rechts nach Strebersdorf führt (Fahrpreis von Wien 32 g) und von da entweder mit Autobus bis Hauptplatz Korneuburg oder zu Fuß (ungefähr 1 Stunde).

Ab Korneuburg Hauptplatz 10 Uhr nach Kreuzenstein zu Fuß 45 Min. oder mit Autobus. Besichtigung der Burg. Die nicht die Burg besichtigen wollen, lagern um die Burg. Mittagessen mitnehmen. Essen in gutem Gasthof erhältlich.

Nachmittags 5 Uhr Rückmarsch

Zu recht zahlreicher Beteiligung lade ich alle samedianoj ein. Steiner

Aŭstria antologio el la 20-a jc.

Mi deziras eldoni tian antologion kaj petas, ke rondoj kaj unuopaj samideanoj el nia lando, kiuj deziras kunlabori, anoncu sian pretecon kunhelpi per proponoj kaj traduko.

Skribu afable baldaŭ! Steiner

Ruĝaj primoloj.

De Julius Holzleithner, Gmunden.

Ĉu vi jam vidis ruĝajn primolojn? Sendube: vi vidis eĉ diversajn specojn de ruĝaj primoloj, fremdlandajn kreskaĵojn, kiuj, en beletaj florpotoj ornamas la fenestrojn de niaj loĝejoj aŭ, en longaj vicoj, staras en la vitrodomoj de la ĝardenistoj. Sed mi ne parolas pri tiuj ĉi fremdaj gastoj; mi demandas: ĉu vi jam vidis ruĝajn primolojn, sovaĝe kreskantajn sub nia patruja ĉielo, kiuj amase floras sur printempa herbejo, enlandaj plantoj, same multnombraj kiel la ordinaraj sulfurflavaj aŭ orflavaj primoloj? Tio ja estas tute alia afero kaj mi devas supozi, ke nur tre malmultaj legantoj povos jesi la lastan demandon.

Ĉar oni ne trovas ruĝajn primolojn en „Prater" aŭ en Neuwaldegg aŭ aliloke en la ĉirkaŭaĵo de Wien kaj de niaj aliaj grandaj urboj (ili kreskas nur en malmultaj regionoj de nia patrolando), oni devas scii ĉi tiujn lokojn kaj serĉi ĉi tiujn maloftajn plantojn en la soleca silento de kamparaj pejzaĝoj, malproksime de la bruo de urbegoj kaj urboj.

Vi devas akompani min: alikaze vi ne facile trovos la areon, sur kiu kreskas niaj strangaj floroj.

Ĉiujare la unuan de majo mi vizitas miajn longjarajn amikojn. En la ĉirkaŭaĵo de Traunsee mi konas marĉan herbejon, eble 4 hektarojn granda. Komence de majo la tuta areo estas kovrata de multaj centoj da malgrandaj ruĝaj steloj. Jam de malproksime vi vidas violbluan aŭ ruĝan brileton, kuŝantan sur la supraĵo; veninte pli proksimen vi perceptas unu ruĝan primolon apud la alia; la tuta herbejo estas dense plenigata de ili: vi povas admiri la farunprimolon (Primula farinosa L.).

Laŭ aspekto kaj formo ĝi iom diferenciĝas de la konataj flavaj specoj; vi devas imagi ian specon de la supre cititaj fremdlandaj ruĝaj primoloj, malgrandigitaj, kun pli delikataj ruĝaj aŭ siringviolaj koloroj: tiam vi havos veran bildon de la farunprimolo. La verdaj bazfolioj estas kovritaj de sennombraj arĝentblankaj haretoj, formantaj densan tegaĵon velursimilan; sed ili estas tiel malforte fiksitaj sur la epidermo, ke oni povas forviŝi la „farunon" per la mano: farunprimolo.

Estas rimarkinde, ke la loĝantoj de la najbaraj domoj plejparte ne scias, kiaj interesaj plantoj kreskas tute proksime de ili; ĉiutage ili preterpasas la herbejon, ili vidas ankaŭ ian ruĝan floraĵon; sed ili kredas, ke tiuj estas iuj aliaj floroj, kiel tiaj nun kreskas sur ĉiuj herbejoj. Kaj se vi demandas ilin: „Kie estas en ĉi tiu regiono la herbejo kun la ruĝaj primoloj?", ili opinias, ke vi ŝercas, ĉar neniam ili atentis la farunprimolojn.

Sed ni kun ĝoja emocio konsideru la ĉarman mirindaĵon kaj kolektu malgrandan bukedon, kiu plilongigos je kelkaj tagoj la plezuron, dankitan al la ruĝaj primoloj.

Ne prokrastu pagi vian kotizon por 1933, se vi eble forgesis tion fari ĝis nun!

Ne ĝis 1. de julio pagitaj kotizoj estos enkasigataj per poŝtmandato!

Rimarkindaj presaĵoj

Benson School of Esperanto, Newark, USA.

Universala Esperanto-Metodo de d-ro Benson, 1932, 559 pĝ., (tre malgranda kaj malvasta preso), 16×23 cm, 4 uson. dol.

Eksterordinare rimarkinda verko. Arego da bildetoj, instruas E-on (prksm. 11 000). La libro konsistas el 4 partoj: Metoda instruo, krestomatio, vortaro, listoj da samspecaj vortoj (ekz.: ĉiuj adverboj, konjunkcioj [afiksoj troviĝas en la vortara parto]), adverboj ktp. kaj vortoj pri agrikulturo, anatomio ktp., kaj metaloj, reptiloj . . . ktp. Tiu lasta parto estas sola senbilda.

En la **unua parto** estas uzataj 36 lingvoj por klarigi la prononcadon de la E-alfabeto kaj por klarigi la komprenon de korelativaj (Zamenhofaj) vortoj. Alie la metodo estas absolute senpera t. e. sen uzo de periga lingvo. Ĝi progresas de simplaj vortoj de videblaj objektoj al vortgrupoj, enkondukante samtempe la plej oftajn verbojn per trafaj frazoj. Akuzativo: tuj post komenco (mi forte konsentas!); personaj pronomoj: je unufojo (mi ne konsentas), por klarigo

de prepozicioj: speciala zorgemo per bildetoj kaj trafaj esprimoj, por la afiksoj oni trovas la plej taŭgajn paradigmojn. Neniu instruisto bezonas plu cerbumi. — Entute la metodo estas moderna: senpera, sengramatika, intuiciiga, paro iga, . . . ni ja konas sufiĉe la hodiaŭan manieron instrui lingvon; sed ne la libro povas tion plenumi, ĉiam nur la instruisto efektivigas la metodon, kiu ne estas lernebla, sed dependas de instruista talento. Tial ankaŭ la tiaj metodaj libroj ne taŭgas por la meminstruo, ili estas nur bona direktilo — se ili estas bonaj — por la instruisto. Same je nia verko; ĝi ne estas lernolibro por la mano de komencantoj aŭtodidaktaj. La valoro de la verko, laŭ mia opinio, entute ne kuŝas en la metoda parto, sed 1. en la unikeco de la tutaĵo, 2. en la enciklopedia instruo.

La **dua parto** — krestomatio — estus por si mem sufiĉe granda legolibro. Preskaŭ ĉiuj malnovaj kaj novaj E-gazetoj estas eluzitaj. Poemoj ankaŭ troviĝas. La miniaturaj bildoj amuzas kaj interesas la leganton.

En la **tria parto** — vortaro — la vortoj estas difinitaj per E-tekso (laŭ Kabe- kaj Boirac-vortaroj), per bildoj ilustritaj kaj krom tio ofte tradukitaj en 40 lingvojn (speciale abstraktaĵoj). Ĝi enhavas la 4000 radikojn aprobitajn de la Lingvo-Komitato kaj 1500 aliajn sciencajn kaj teknikajn vortojn; krom tio multajn kunmetitaĵojn, do estas vere universala.

Pri la **kvara parto** sufiĉas la rimarko en la komenco.

Estas nemkompreneble, ke oni povus trovi prigrumblajojn en tia unika verko. Ĉu ĉiuj bildoj estas trafaj, estas la plej grava demando pri tiu ĉi vera bildverko? Mi sincere respondas: jes. Ĉu ili elvekas en ĉiu cerbo la celitan, la saman ideon? certe ne; multaj eĉ estas veraj bild-enigmoj. Sed estas ja facile elveki la ideon „muŝo“, „tablo“ k. s. per bildo, jam malfacile estas bildigi la vorton „abismo“, despli ĉe abstraktoj. Tamen la bildoj ĉiam instruas, inspiras, surprizas, amuzas.

Eminenta estas la enciklopedia valoro de la verko, ĝis nun tiaspece ne ekzistanta en la E-verkaro. Premu la libron en la manon de klerema homo kaj li ricevas inciton lerni Esperanton. Ekzemple, vi serĉas la vorton „papo“ — vi trovos sufiĉe bonajn portretojn de 4 famaj papoj. Tiamaniere vi povas konatiĝi kun kelkaj famaj inĝenieroj, revoluciistoj, iniciatoroj, socialistoj ktp. — kiel praktike uzeble por krucvortenigmoj!

La libro ne nur estas interesa kaj instrua por Esperanton-instruanto, por perfektiĝema esp.-isto, sed ankaŭ por ĉiu klera homo.

Preseraroj ekzistas, ekz.: polpo (polpo) pĝ. 27, nergens = la germana esprimo por „nenie“ p. 90, sultro (ŝultro) 501, k. s. — Strange estas la formo „ĉesiĝas“ en la frazo: doloro ne ĉesiĝis (p. 77); versajne uzata kiel la vorto „fini“ (a teatraĵo finiĝas); sed „fini“ estas transitiva verbo dum „ĉesi“ estas intransitiva. Paĝe 164 mi trovis la indikon pri konstrudaŭro de lumturo: 280-299, kvankam la tempo estas antaŭ Kristnasko (korekte: 299-280). Ludw. Siedl

Esperanto Roman-Gazeto.

La eldonanto kaj redaktoro, nia konata Lingva Komitat-ano Friedrich Ellersiek, Berlin SW 61, Wilmsstraße 5, deziras per tiu nova gazeto respondi la deziron de multaj esp.-istoj, legi mallongajn romanojn, originalajn kaj tradukitajn, en modelstila Esp. ne en libroformo sed en gazeto. Post julio la gazeto regule elvenos, pojare 6 Rm. Specimena numero, senpage jam nun mendebla.

Kunvenoj de esperantistoj.
Zusammenkünfte der Esperantisten.

Baden: N. Pronay, Bahngasse 2.

Braunau a. I.; Haselbauer, Linzerstr. 7/II.

Graz.

E-Verein für Steiermark, Schönaugasse 6/II, Heim: Bürgergasse 4, Fr (v) 20-23 h.

E-Verein „Em. Peltier“, Sackstr. 16/II, Mo (l) 20 h.

Gr. Siegharts: Portier Novotny, Fabrik.

Innsbruck: Hotel Grüner Baum, Museumstr. 35, Do (j), 20 h.

Klagenfurt: Elektrizitätswerke.

Linz: Gasthaus Stadtgut, Volksgartenstraße.

Salzburg:

E-Grupo: Gastejo Schwarzes Rössel, Berggasse, Mi (mk) 20 h.

E-Grupo „Estonteco“, prez. Kapŝ, Dreifaltigkeitsgasse 14.

Sigmundsherberg: Schule, Fr (v) 20 h.

Steyr: Schlüsselhofstr., Fr. (v.), 20 h.

Wien.

D-ro Sos-Grupo, I., kafejo Kolowratring, Schubertring 2 Fr. (v.) 19 h.

E-Org. de Ofichavantoj, IV. Schäffergasse 3, Mag. Bez.-Amt, ĉiutage esc. sabate; 19 h.

Esp.-societo „Fideleco“, Café Zoglmann, XVIII., Staudgasse 1, Di (m), 16-19 h.

Koloman Kalocsay-Grupo ĉe s-ro Hovorka, IX. Löblichgasse 3, Mi (mk) 19 h.

Libera E-Rondo „Verda Angulo“, kafejo Hrdy, XVI. Ottakringerstr. 119: Mi (mk) 20-22 h.

E-Rondo „Kolonelo Zwach“ ĉe Stafa, VII. Mariahilferstr. 120. Di (m), 16-18 h.

Katolika Unuiĝo E.-ista en Wien, I. Freyung 6 (Schottenpfarrkanzlei) Mi (mk) 18—20 h.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Regierungsrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstr. 154. — Presejo: S. Falk, Wien, XIII, Nobilegasse 4.